Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 13an de decembro 2012, per Skype.

(Protokolo aprobita la 31an de januaro 2013.)

Partoprenis:
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Ulf Lunde en Os (dum punktoj 4 kaj 6)
Anne Karin Bondhus en Bryne (ekde punkto 2)
Ingebjørg Rambjør en Bergen
Mario Machlik en Tromsø
Asbjørn Lindh en Oslo
Eli Fitjar en Bergen

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 23an de novembro 2012
La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio
La kasisto Anne Karin Bondhus raportis:
Skagen vekst: 33 001 kr
Skagen høyrente: 62 391 kr

3. Seminario
Mario Machlik raportis pri la laboro ĝis nun. Li plulaboros kaj respondecas pri tio.

4. Strategia plano
Asbjørn Lindh eklaboris pri la plano. Li daŭre laboras, kaj la propono estos diskutata plu dum la januara estrara interkonsiliĝo.

5. Lingvojaro 2013
Mario Machlik raportis pri la kontakto kun Språkåret. Li faros artikolon en la venonta numero de *Norvega Esperantisto* pri la Lingva jaro kaj la ebleco por kluboj aŭ aliaj organizemuloj reklami siajn aranĝojn registrante ĝin en la kalendaro de la Lingva jaro.

6. Eventualaĵoj
Memorŝtono en Narvik: En Narvik estas ŝtono memorfestanta Esperanto-okazaĵon en la urbo en 1934. Tiu ŝtono nun bezonas renovigon. La klubo Norda Lumo en Tromsø prenas la respondecon por tio. Oni petos subtenon de Fondaĵo Uhlen.

La interkonsiliĝo daŭris 19.34–20.40.
La venonta interkonsiliĝo okazos la 24an de januaro 2013 (prokrastita ĝis la 31a de januaro).
Raportis Ingebjørg Rambjør.